

Pri la cervoj kaj kapreoloj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 547-86-2, 1982 januaro.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1981-86/SRI-1982-86-2-547-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-cervoj-kaj-kapreoloj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

El la familio de la cervedoj loĝas en la svisaj arbaroj du reprezentantoj: la lerta kapreolo, kiu renkontiĝas ĉie, kaj la stature preskaŭ trifoje pli granda cervo, kiun oni povas observi en la naturprotektejo nomata Nacia Parko, en la kantono Grizono.

A.- La aliaj cervidoj, t.e. la damao la alko kaj la boaco ne nature vivas en Svislando. Tial nur en bestĝardenoj ilin oni povas admiri.

Cl.- Ni memorigas, ke tiuj remaĉuloj havas kiel karakterizon perdi ĉiuaŭtune siajn imponajn kornojn, kiuj pli kaj pli disbranĉiĝas je la rekresko printempa. Kontraŭe, la ibekoj kaj la ĉamoj, pri kiuj ni jam raportis en du radioprelegoj, apartenas al la familio de la bovedoj kun la kaproj, bovoj kaj ŝafoj. Ili interalie ne perdas siajn kornojn, kiujn ĝenerale ambaŭ seksoj posedas.

A.- La cervo siatempe vivis en la arbaroj de tuta Eŭropo. Kaj oni ĉiam miris, ke tiu besto kun tiom vaste disbranĉitaj kornoj elektas la densajn arbarojn kiel loĝlokon.

Cl.- Ekde fru-mezepoko, ne nur la nobeloj ĝin ĉasadis, sed ankaŭ la kamparanoj, kiuj ĝin malamamis pro la detruoj, kiujn ĝi ĉefe printempe kaŭzas al la kultivaĵoj. Ankaŭ la kapreolo emas viziti la kultivitajn herbejojn, sed ĝi modestas en sia apetito kaj ĝi ne plugas la molterajn kampojn per siaj kornoj, kiel faras la cervoj. Tial la kapreolo estas ŝatata gasto, kiun la kamparanoj ĉiam respektis.

A.- La cervoj kaj la kapreoloj ĉefe kaŭzas difekton al la arboj, kiam al la maskloj rekreskaj la kornoj. Tiujn ĉi envolas haŭto, kiu sekiĝas en la monato julio. La bestoj estas tiam tiklataj kaj ili sentas la bezonon sin liberigi de tiuj falantaj kaj ofte sangantaj haŭteroj per frotado de siaj kornoj kontraŭ la trunko de la arboj, kies ŝelon ili ofte komplete forskrapas. Kiam tiuj bestoj abundas, tutaj arbaroj povas tiel neniigĝi en kelkaj jaroj. Tial la forstistoj emas limigi la nombron de tiuj bestoj al tolerebla kvanto da individuoj.

Cl.- La nuna arbarkultivado, kiel ĝi estas pli kaj pli praktikata en tuta Svislando, t.e. la forstĝardenado estas tre favora al la kapreoloj, kiuj ĝuste elektas kiel loĝlokon arbarojn ne tro densajn.

A.- Tre timemaj, la kapreoloj kaŝiĝas en veprejoj dum la plej granda parto de la tago. En tiuj arbetejoj ili pretigas al si kuŝejon, kie ili restadas dum horoj remaĉante aŭ dormante. Ili ekmigradas fine de la posttagmezo, irante paŝti borde de la arbaro, kaj en printempo ĝis meze de la kampoj. La tutan nokton ili vagadas. Je la sunleviĝo ili reiras en sian kaŝejon.

Cl.- Iom sammaniere vivas la cervoj, sed ili bezonas multe pli vastajn migradejojn ol la kapreoloj, kiuj estas malpli timemaj kaj pro tio pli facile adaptiĝas al la homa najbareco, se tiu ĉi estas respektima al ilia intimeco.

A.- La kapreoloj havas bonegan flarsenton kaj fajnan aŭdopovon. Pro tio estas ege malfacile ilin malkovri ĉe iliaj kuŝlokoj. Tage oni pli aŭdas iliajn forkurojn en la arbaro ol oni vidas ilin.

Se oni volas ilin observi, tion oni faru prefere frumatene aŭ ekvespere, kiam ili emas paŝtmigri. Ili vivas en etaj aroj kaj la maskloj tre ofte solas.

Cl.- La seksarda sezono estas por ili la finprintempo kaj la somero. La sekskuniĝoj okazas en junio, julio, aŭgusto kaj eĉ septembro. Sed la embrioj post ekkresko restas senprogresaj en sia disvolviĝo ĝis la monato novembro. Nur ekde tiam ili normale disvolviĝas. Stranga, nekutima naturfenomeno, ne nepre regula ! Tial, se la granda plimulto de la idoj naskiĝas finaprile, maje aŭ eĉ junio, escepte povas okazi naskiĝoj dum ĉiuj monatoj de la jaro, ĉar la halto en la embrio-formiĝo povas esti nula aŭ pli longa.

A.- La kapreoloj, kiel la cervoj aŭdigas muĝon ne nur okaze de la seksarda sezono, sed ankaŭ kiam ili troviĝas en malfacilaj aŭ timigaj situacioj. La kapreolaj muĝoj iom similas al la raŭkaj bojoj, dum la cervaj muĝoj impresigas la vizitantojn de la Nacia Parko en Grizono pro sia vigleco kaj varieco. La best-observanto, Robert Heinard raportas ke en la seksarda sezono, kiu por la cervoj ekas meze de septembro kaj kulminas meze de oktobro, la maskloj krias dum la tuta nokto kaj eĉ, sed iom malpli, dum la tuta tago. Ilia muĝado pensigas al tiu de koleraĵaŭroj aŭ eĉ al la rorado de leonoj.

A.- La voĉalteco neniel kongruas kun la grandeco de la besto. Grandegaj maskloj povas havi plialttonan voĉon ol pli junaj. Robert Heinard skribas, ke oni travivas profundan emocion, kiam oni silente alproksimiĝas al tiu laŭtega voĉo en la ombro de glacia nokto, kie la lunlumo amuziĝas sur la kunplektitaj mort-trunkoj de la sovaĝa montara arbaro. Kaj li aldonas, ke delokita cervo ekkuradas kun malkvieto, muĝante, kun videbla kolero.

A.- Cervo, kiu renkontas homon ĉiam forfuĝas. Tiurilate jen bela priskribo de Robert Hainard :

Cl.- « Ili subite ekcidis min, kiam ili alvenis je 5 aŭ 6 metroj al mi. Mi senmove staris meze de neĝkampo. La nokto estis preskaŭ alveninta. Granda cervo turnadis longe ĉirkaŭ mi, je dudeko da metroj. Muĝante kaj flarante kun mikso da kolero kaj malkvieto. Kia timinda fameco rajtigis min star-resti kun fido, senarme antaŭ tiu bestego fortika kaj lerta, du- aŭ trifoje pli peza ol mi, kies akrajn plurpintajn kornojn mi vidis brileti ? Fine, kiam ĝi identigis min, ĝi simple foriris.

A.- Oni diras, ke seksarda cervo atakemas al homo. Reinhard Opinias, ke tio povas okazi en cervoparkoj, kie tiuj bestoj troviĝas daŭre en defenda situacio kontraŭ la atakemaj ĉasistoj. Sed ke en normalaj kondiĉoj ne tiel estas.

Cl.- Cervoj elmontras pli da atakemo, kiam ili solas, ol antaŭ konkurantoj kaj inoj. En la seksarda periodo la energiplenaj maskloj ofte enbatas siajn plurbranĉajn kornojn en la grundon, kiun ili plugas per duoncirkla movo. La kolo arkigita kaj donante videblajn signojn de emocio. Alifoje, per grandaj kornfrapoj, ili sentigas sian bataleman humoron al malfeliĉaj arboj, lasante al ili nur kelkajn rarajn nerompitajn branĉojn. Ni jam diris, ke tiuj ĉi detruoj vekis la malamon de la kamparanoj al la cervoj. Kontraŭe, la kapreoloj estas pli moderaj en siaj detruoj, sed tamen estas fakto, ke ankaŭ virkapreoloj ŝatas eksterigi sian agresemon kontraŭ senkulpaj arboj, kiujn ili komplete detruas, sed neniam ili plugas kampojn.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond rakontis pri la vivo de la cervoj kaj kapreoloj. Ĝis reaŭdo!